35. Benu, animo mia (Psa 103)



3. Ĉar kiel altas super ter' ĉielo,
tiel al ni boneco Lia grandas,
superas tiujn, kiuj timas Lin.
Malproksimigas Li de ni la pekojn
for, kiel orient' de okcidento.
Li kiel patro kor-favoras nin.

4. Tagoj de homo estas kiel herbo:
Li ja ekfloras kiel kampa floro,
sed kiam pasas vento super ĝi,
vent' el dezerto, ĝi jam ne ekzistas,
kaj ĝia loko ĝin jam ne rekonas. –
Boneco Dia daŭras en etern'.

5. La Eternul' starigis Sian tronon
en la ĉielo, regi super ĉio,
anĝeloj Liaj ĉiam benu Lin.
Benu Lin ĉiuj Liaj ĉirkaŭantoj,
Liaj servantoj, ĉiuj kreitaĵoj.
Animo mia, Dion benu vi.

BENU, ANIMO MIA, L' ETERNULON • M (Psalmo 103): Strasburgo 1539/1543, LvK p. 174 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2008